# SAGISTO

Baltiaj Esperanto Tagoj
ŠIAULIAI

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET43

ĈIUTAGA INFORMILO DE **BET-43** **N-RO 7** | 2007 07 21, SABATO

## ADIAŬA VORTO








La programo de BET-43 hodiaŭ jam atingos sian finon. Vi nun tenas en la manoj la lastan numeron de "SAGISTO". Ja ne ekzistas sagisto sen celo. Mi strebis, ke vi havu necesajn freŝajn informojn. Tamen pro la limhoro por sendi al la presejo mi ne povis enmeti en la sekvatagan numeron raportetojn de tiuj aranĝoj, kiuj okazis posttagmeze aŭ vespere.



Bedaŭrinde, pro teknika problemo la dua numero havis iom alian aspekton kaj eĉ ne povis montri ĝustan formon de ĉapelitaj literoj. Ĉiujn numerojn vi povas ankaŭ legi jam en la retejo: http://www.esperanto.lt (en BET-43). Mi kunredaktis la gazeton "MEANDRO" de BET en Birštonas, kaj redaktis ĉi tiun gazeton "SAGISTO". Ĉi-foje ja mankis materialoj, tial la gazeto iĝis kvazaŭ fotogazeto.



Mi kore dankas al vi ĉiuj legintoj, raportintoj kaj provlegintoj. Mian adiaŭan vorton akompanu fotoj el nia gajplena vespero merkrede en la 18an de julio. Bonordan hejmenveturon kun bonaj impresoj pri BET-43 kaj pluan aktivan kunlaboron por BET deziras via eksiĝanta redaktoro,

**CHOE Taesok**



## Koloroj de Japanio

Ĵaŭde prelegis Lydia LINDLA pri "Koloroj de Japanio". La aŭskultantoj ĝuis impresojn kaj japanajn fotojn, kiujn dum prelego prezentis Lydia LINDLA. Kun la mirakla lando ŝi konatiĝis pasintaŭtune danke al gastigantoj Tadaŝi kaj Ŝimako JAMADA el Nagojo kaj la renkontinto en la fluĝaveno Akira ISOBE. La spertoj el la rondvojaĝo utilis al tiuj, kiuj baldaŭ partoprenos en la Jokohama UK.

**Raportas Vytautas ŠILAS**



## Kvizo sukcesis

Aventuris la sorto de la programo "Kvizo pri ĝeneralaj demandoj". Ĝi komence estis planita en lundo kaj poste translokita al mardo, sed tiam nur kelkaj ĉeestis kaj ĝi estis denove translokita. Fine ĵaŭde vespere la kvizo, kiun gvidis Nora CARAGEA helpe de Vilius ŠIDLAUSKAS, sukcese finiĝis kun la ĉeesto de kvindeko da esperantistoj.




## Ekspozicioj



Okazis etaj ekspozicioj en la Libroservo: ekspozicio de Esperanto-signoj en diversaj materialoj kaj teknikoj fare de Aŭdra ŠIDLAUSKIENĖ, kaj tiu de Esperanto-insignoj fare de Rimantas ENDRIULAITIS.

**Ĵaŭde "Želmenėliai" kaj "Dermė" koncertis litovajn kantojn kaj dancojn.**



## KIO OKAZOS HODIAŬ

### 21an de julio (sabate)

09:00–11:00 Lecionoj de ĉiunivelaj E-kursoj
*Aŭditorioj 6, 8, 9 kaj 15*

09:00–11:00 Somera universitato. Prelegoj de Petras ČELIAUSKAS "Esperantigo de beletra literaturo" kaj de Zenonas SABALYS "Litova studenta Esperanto-movado dum 1956-1960"
*Aŭditorio 17*

10:00–11:00 Baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo
*Aŭditorio 10*

11:00–12:00 Prepariĝo al la solena fermo de BET-43

12:00–14:00 Tagmanĝo

14:00–15:00 Solena fermo de BET-43
*Ĉefsalono*

15:00–18:00 Libera tempo

18:00–19:00 Koncerto de akordeonistoj de la urba Konservatorio
*Ĉefsalono*

**BONORDAN HEJMENVETURON**

22an de julio okazos neniu programo en la BET-jo.

*— La organiza komitato de BET-43 —*

# UNUA INFORMILO DE BET-44

Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni en BET-44 (Baltiaj Esperanto-Tagoj), la plej populara Esperanto-aranĝo en Baltiaj landoj, aranĝo kiu havas jam preskaŭ 50-jaran historion (la unua BET okazis en 1959 ĝuste en Latvio).

**Tempo:** BET-44 funkcios de la 5a ĝis la 12a de julio 2008

**Loko:** BET-44 okazos en Ventspils – la plej prospera urbo de Latvio, populara turisma centro kaj unu el la plej grandaj havenoj de Baltia maro. Ventspils situas 189 kilometrojn for de la ĉefurbo Rigo en la nordokcidenta parto de Latvio ĉe la enfluejo de rivero Venta en Baltian maron. Areo de Ventspils estas 55,4 km2, el kiuj 38% okupas arbaroj, parkoj kaj akvo. Laŭ la kvanto de la loĝantaro (preskaŭ 44 000) ĝi estas la sesa urbo de Latvio.

Ventspils estas unu el la plej antikvaj urboj de nia lando – la unuan fojon ĝi estis menciita en historiaj dokumentoj en 1290. La urbo fieras pri sia kastelo de Livonia ordeno – unu el la plej antikvaj mezepokaj fortikaĵoj de Latvio. En la kastelo nun situas muzeo kun la sola en Baltio digitala ekspozicio "La viva historio".

Oni rekomendas viziti ankaŭ la Ĉemaran liberaeran muzeon kun etŝpura fervojo, plaĝon de "Blua flago", akvaparkon "Ventspils" k.a.

La urbo estas fama per siaj prizorgitaj parkoj, pavimitaj placoj, promenstratoj laŭ rivero Venta kaj Suda havendigo.

Partoprenantoj de BET-44 havos eblecon partopreni en distraj kaj amuzaj aranĝoj de la urbo, ripozi ĉe maro, veturi per jaĥtoj kaj ŝipetoj.

La urbon povas atingi per busoj el Rigo, Liepāja kaj aliaj grandaj urboj de Latvio. Al Ventspils per pramo eblas veni el Rostock (Germanio), Nynäshamn kaj Karlshamn (Svedio) kaj Saaremaa (Estonio).

BET-ejo situos en la urbocentro.

**Provizora programo:** diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, seminario pri problemoj de Esperanto-movado, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.

**Aliĝkotizo:** en latoj (Ls):
a/ ĝis la 31.12.2007,
b/ ĝis la 31.03.2008,
c/ poste kaj surloke

| | a | b | c |
|---|---|---|---|
| Latvio, Litovio, Estonio | 7 Ls | 12 Ls | 17 Ls |
| Ekssocialismaj landoj | 10 Ls | 15 Ls | 20 Ls |
| Okcidentaj kaj ceteraj landoj | 15 Ls | 20 Ls | 30 Ls |

Infanoj ĝis 15 jaroj aliĝkotizon ne pagas. Lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas 50% de la kotizo.

Proksimuma kurzo: 1 Ls = 1,42 EUR = 1,94 USD
1 EUR = 0,7 Ls, 1 USD = 0,51 Ls

**Loĝado:** ekzistas diversaj loĝeblecoj:
1) po 4-6 Ls diurne por persono en kelklita (2-7) ĉambro en hosteloj en la urbocentro, necesejo kaj duŝejo en koridoro;
2) po 6-7 Ls diurne por persono en dulita ĉambro en studenta hotelo de Ventspils altlernejo, necesejo kaj duŝejo por du apudaj ĉambroj;
3) ekde 15 Ls-120 Ls en diversnivelaj hoteloj;
4) estas ebleco noktumi en kampadejo:
a) en 4-5 litaj dometoj (15-28 Ls por dometo),
b) 1,5 Ls por loko en tendo.

**Aliĝo:** plenigitan aliĝilon sendu al:
*Latvia Esperanto-Asocio*
*p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio*
Eblas aliĝi rete: *margarita.zelve@gmail.com*

Samtempe pagu aliĝkotizon. Aliĝilojn povas ricevi de Latvia Esperanto-Asocio poŝte aŭ rete. Oni rajtas aliĝilojn kopii laŭbezone.

**Pageblecoj:**
1) sendi poŝte al Latvia Esperanto-Asocio (al kasistino Aina Januševska) kun 10% alpago por poŝtaj operacioj;
2) ĝiri al konto de Latvia Esperanto-Asocio lase-b ĉe UEA (kun indiko: por BET-44);
3) interkonsenti kun Organiza Komitato pri alia pagmaniero;
4) pagi per kontanta mono al kasistino de BET.
*Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de la kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).*

**Kontakteblecoj:**
1) poŝte: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio
2) rete: *margarita.zelve@gmail.com*
3) telefone: + 371 26407174 (Margarita Želve)
+ 371 67383461, + 371 28486628 (Biruta Rozenfelde)

**BONVENON AL LATVIO!**
*Organiza komitato*



# LITOVA GAZETARO PRI BET-43

*En litova gazetaro aperis multaj informoj pri BET-43 kaj jen estas la listo:*

1. Respublika tutlanda gazeto en litova lingvo "Lietuvos aidas" la 12an de Julio, 2007 publikigis tutpaĝan artikolon de Povilas JEGOROVAS pri BET-43. Estas metita emblemo de BET-43 kaj esperantista flago.
2. Respublika tutlanda gazeto en pola lingvo "Kurier Wilenski" la 11an de julio, 2007 publikigis ampleksan duonpaĝan artikolon pri BET-43 kaj pri Esperanto ĝenerale. Estas metita portreto de Ludoviko ZAMENHOF.
3. Semajna gazeto de Norda Litovio en litova lingvo "Express Kontaktas" la 13an dejJulio, 2007 publikigis tre ampleksan artikolon de Povilas JEGOROVAS pri BET-43.
4. Semajna gazeto de Šiauliai "Šiauliai plius" en litova lingvo la 13an de julio, 2007 publikigis redakcian informon pri BET-43.
5. Ĉiutaga gazeto de urbo Šiauliai kaj de regiono en litova lingvo "Šiaulių kraštas" la 11an de julio, 2007 publikigis ampleksan gazetaran komunikon pri BET-43.
6. Ĉiutaga gazeto de urbo Šiauliai kaj de regiono en litova lingvo "Šiaulių kraštas" la 14an de julio, 2007 sur la unua kaj la sesa paĝoj publikigis tre ampleksan preskaŭ tutpaĝan artikolon-intervjuon kun Zenonas SABALYS pri historio de BET-oj kaj BET-43, Estas metitaj 4 fotoj.
7. Urba ĉiutaga gazeto de Šiauliai en litova lingvo "Šiaulių naujienos" la 14an de julio, 2007 publikigis redakcian informon pri BET-43.
8. Urba ĉiutaga gazeto de Šiauliai en litova lingvo "Šiaulių naujienos" la 18an de Julio, 2007 mallonge informis pri la urbestra akcepto de la delegacio de partoprenantoj de BET-43.
9. Tutlanda ĉiutaga gazeto (retgazeto en litova lingvo) "Lietuvos rytas" la 14an de julio, 2007 publikigis ampleksan informon de Povilas JEGOROVAS pri BET-43.
10. Litova tutlanda nacia radio en litova lingvo la 14an de julio, 2007 disaŭdigis ampleksan intervjuon kun Povilas JEGOROVAS pri BET-43.
11. Litova nacia tutlanda radio en rusa lingvo la 14an de julio, 2007 disaŭdigis ampleksan intervjuon kun Povilas JEGOROVAS pri BET-43.
12. Litovaj novaĵagentejoj ELTA kaj BNS dissendis ampleksan gazetaran komunikon pri BET-43 al siaj abonantoj kaj aperigis ĝin respektive en siaj retejoj.
13. Estona novaĵagentejo de BNS la 18an de Julio, 2007 dissendis gazetaran komunikon pri BET-43 kaj metis la informon en sian retejon.
14. Televido de Šiauliai la 17an de julio, 2007 disaŭdigis kaj disvidigis intervjuon kun Povilas JEGOROVAS kaj pli ampleksan raporton pri BET-43.
15. Semajna gazeto de Šiauliai en litova lingvo "Šiauliai plius" la 20an de julio, 2007 aperigis ampleksan artikolon-intervjuon kun Romualdas RUTKAUSKAS, Povilas JEGOROVAS, Aleksander KORĴENKOV k.a. pri BET-43. Artikolo estas ilustrita per multaj fotoj.
16. Televido de Siauliai "Splius" la 18an de julio 2007 montris ampleksan raporton pri BET-43, interalie, ankaŭ pri instruado pri Vikipedio.

Ĉi-tie estas menciitaj nur tiuj publikaĵoj, pri kiuj ni sukcesis ekscii kaj rimarkis ilin. Sendube, estas pli multaj, ĉar Litova Esperanto-Asocio ampleksan kaj detalan gazetaran komunikon pri BET-43 rete dissendis al ĉiuj litovaj gazetoj, radioj, televidoj, informaj agentejoj, retgazetoj k.s. (entute al pli ol 100 adresoj).

**Povilas JEGOROVAS**

## Statistiko de BET-43

La 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj fariĝis rekordaj en tiu ĉi nova jarcento kaj jarmilo. Entute laŭ aliĝiloj BET-43 partoprenas 322 personoj el 18 landoj:

| | | |
|---|---|---|
| Litovio – 167 | Latvio – 54 | Pollando – 53 |
| Finnlando – 9 | Estonio - 9 | Belorusio - 6 |
| Rusio - 6 | Belgio - 3 | Germanio – 3 |
| Italio - 3 | Aŭstrio - 2 | Ĉeĥio - 1 |
| Francio - 1 | Nederlando – 1 | Portugalio – 1 |
| Slovakio – 1 | Ukrainio – 1 | Svedio - 1 |

Litovion reprezentas esperantistoj el 23 urboj (Vilnius – 34 , Kaunas – 25 , Panevėžys – 23 , Šiauliai – 23 , Joniškis – 16 , Mažeikiai – 7 , Naujoji Akmenė – 6 , Klaipėda – 4 , Kretinga – 4 , Pasvalys – 4 , Marijampolė – 3 , Druskininkai – 2 , Jonava – 2 , Kuršėnai – 2 , Birštonas – 1 , Jurbarkas – 1 , Kelmė – 1 , Pakruojis – 1 , Šalčininkai – 1 , Šilutė – 1 , Švenčionys – 1 , Telšiai – 1 , Žagarė – 1).

Efektive BET-43 partoprenas ankoraŭ pli multaj personoj, ĉar tiun ĉi statistikon ne eniras multaj litovaj unutagaj kaj kelkhoraj partoprenantoj , kiuj ne registriĝis.

Estas preta la Adresaro de BET-43, kiun ĉiu povas preni ĉe la registrejo.

**Povilas JEGOROVAS**